

THE BRITISH ESPERANTIST

OFFICIAL ORGAN OF THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Inc.)

ISSUED ON THE 15TH OF EACH MONTH.

SUPPLIED TO MEMBERS ONLY.

Vol. XXV.—No. 287.

FEBRUARY, 1929.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INCORPORATED).

142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Telephone: Holborn 4794.

Telegrams: "Esperanto", Westcent, London.

Late Hon. President: DR. L. L. ZAMENHOF.

Hon. President: J. M. WARDEN.

President: JOHN MERCHANT.

Hon. Vice-Presidents: G. D. BUCHANAN, MISS E. A. LAWRENCE.

Vice-Presidents: J. J. BOUTWOOD, J.P., PROF. W. E. COLLINSON, M.A., Ph.D., W. HARVEY, I.S.O.

Hon. Secretary: ROBERT ROBERTSON.

Hon. Treasurer: CHARLES A. FAIRMAN.

Secretary: MONTAGU C. BUTLER, L.R.A.M.

Business Manager: CECIL C. GOLDSMITH, F.C.I.

Office Hours: 9—5.30. (Monday till 8.30, Saturday till 12.30).

The Association consists of Fellows Members, Associates, Affiliated Groups and Federations. The Annual Subscriptions are: — Fellows, 21s.; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2s. 6d.; Life Fellowship, £12 : 12 : 0; Life Membership £5.

A list of Affiliated Federations and Groups will be sent on application. Group Affiliation fee: 6d. per member per annum; minimum, 5/-.

This Official Organ is sent each month to Fellows and Members.

"INTERNATIONAL LANGUAGE."—A monthly magazine in English, devoted to the study of the International Language problem. Includes instructional articles on Esperanto and *The Esperanto Student*, a supplement for beginners. Subscription, 2/6 per annum, post free.

1929.

La nova jaro komenciĝis bone por ni—nia librovendado en Januaro atingis preskaŭ la duoblon de tiu en Januaro, 1928.

La artikoloj kaj lecionoj en *World Radio* vekis grandan intereson. En 26 tagoj ni ricevis 420 respondeojn al reklamo en la numero de la 4a de Januaro. El la respondintoj jam kelkaj aliĝis al la B.E.A. aŭ abonis al *International Language*, kaj multaj aĉetis lernolibron.

La firmo Cadbury Brothers, Ltd., nun fabrikas skatolojn de "Esperanto Chocolates." Tio en si mem ne estas afero grava, sed grava estas la fakto, ke la firmo vendas ilin pere de la ordinaraj butikoj, kaj ke ĉiu skatolo enhavas folieton pri Esperanto. Do se vi deziras propagandi Esperanton en via regiono, bonvole zorgu, ke via sukerajisto vendu tiujn ĉokoladojn. Ili estas pakitaj en skatoloj duonfuntaj aŭ unufuntaj. Kompreneble, la butikisto devas mendi ilin ĉe la firma laŭ la kutima maniero.

La kontoj por 1928 aperos en la venonta "B.E." Ni jam pretigis buĝeton por 1929, kiu antaŭvidas multe pli bonan jaron de la financa vidpunkto. Sed unu afero nepre estas klare videbla, kaj tio estas, ke por certigi firman financan situacion kaj la eventualan forigon de la garantia kaso, ni devas varbi kelkcentojn da novaj membroj por nia Asocio. Tio estas afero ja ĉefgrava.

Sendube vi volas helpi tiurilate. Sed tro ofte pro forgeso oni ne uzas bonan okazon. Por instigi vin helpi al la varbado de 500 novaj

membroj dum 1929 (kaj tio estas cifero ja tre modesta), ni decidis doni al ĉiu membro, kiu varbos novan membron dum la jaro, unu el la sekvantaj libroj laŭ lia elektio:—

(1) *Mimi*. (2) *Ok Novejloj*. (3) *La Praktiko de la Apudesto de Dio*. (4) *Rememoroj de Esperantisto*. (5) *Sonĝo de Someromeza Nokto* (broš.). (6) *Paketo de kantoj kun muziknotoj*: Esperanto (Harrison Hill), Himno de Danko, La Vera Frataro, La Vojo. (7) *Stranga Idilio*. (8) *Tatterley*. (9) *La Venecia Komercisto*.

Jen via ŝanco helpi al la Asocio, kaj samtempe mem profiti. Uzu ĝin! Se vi bezonas varbilojn, plezure ni sendos ilin. Jam en Januaro aliĝis 49 novaj membroj. Tio estas bona komenco. Klopodu nun gajni la ceterajn 451.

Kun la celo fari pli vastan kaj efikan propagandon, helpi al izolitaj membroj kaj grupoj, starigi grupojn en novaj lokoj, kaj pligrandigi la vendon de Esperanta literaturo, ni decidis aĉeti propagandan aŭtomobilon, tuj kiam ni kolektis la sumon de £150. Jam ni ricevis £80 : 8 : 2. mone aŭ promese por tiu celo. Ĉu vi mem helpis en tiu grava propaganda pašo antaŭen?

20a BRITA ESPERANTA KONGRESO County Hall, Canterbury, Pentekosto, 1929.

Patronoj

H.R.H. La Duko de Connaught, K.G., La Urbestro de Canterbury (Captain Van Sittart Howard, D.S.O., R.N.), La Ŝerifo de Canterbury

(Urbkonsilanto W. P. Pierce), S-ino Gardiner, J.P., Pastro A. F. Taylor, M.A.

Programo

Vendredo. Interkonatiĝa Vespero.

Sabato matene. Vagadoj en la urbo.

3.0 ptm. Jara Kunveno de la B.E.A.

7.30 „ Publika Kunveno kaj Teatraĵeto. Diversaj grupoj kaj federacioj prezentos ses etajn scenojn el la historio de Canterbury. Oni jam aranĝis pri la prezento de kvar scenoj. Oni petas, ke la sekretario de iu grupo aŭ federacio, kiu eble povus helpi pri la du aliaj scenoj, skribu senprokraste al S-ro Goldsmith.

Propagandoj paroletoj kaj komuna kantado inter la scenoj.

Dimanĉo. 11.0 atm. Kongresa Diservo.

12.15 ptm. Fotografo.

1.0 ptm. Kongresa Lunĉo.

2.30 „ Kunveno de B.E.A. Lokaj Re-prezentantoj.

3.30 „ U.E.A. Kunveno.

6.30 „ Konferenco de la Sud-orienta Federacio.

8.0 „ Koncerto kaj Paroladoj de Ali-landaj Esperantistoj.

Se vi povos helpi per kanto, deklamo, k.t.p., bonvole sciigu S-ron Goldsmith.

Lundo. 9.0 atm. Tuttaga aŭtomobila Ekskursio al Folkestone. Prezo, kun la lunĉo ĉe la Royal Pavilion Hotel, 9/-.

8.0 ptm. Balo.

Loĝejo.

Hotelo, por lito kaj matenmanĝo, proksimume 7/-, 8/6, 10/-.

Privata loĝejo, por lito kaj matenmanĝo, proksimume 4/-, 5/-, 6/-.

Kongresanoj (53-72)

J. J. Boutwood, G. L. Hayton, F-ino G. Pillar, J. G. Baxter, G. D. Buchanan, Ges. Rhodes Marriott, F-ino E. B. Smith, S-ino I. Taylor, F-ino E. M. Welch, F-ino D. Wilkinson, Ges. G. W. Roome, F-ino Roome, Ges. V. V. Sumfield, S-ino Carey, F-ino M. E. George, F-ino E. E. George, K. R. C. Sturmer.

Biletoj

kostas 3/6, kaj nun estas haveblaj. Aliĝilo troviĝas ĉi-kune. Per frua aliĝo vi multe helpos la laboron de la organizantoj.

ESTU GISDATA PILGRIMANTO AL CANTERBURY!

CECIL C. GOLDSMITH, 142, High Holborn, W.C.1.

ALFRED G. TUCKER, 8, St. Lawrence Villas, Canterbury.

Kun-sekretarioj.

INTERNATIONAL HOLIDAYS.

Our arrangements for 1929.

We give below brief particulars of the Caravans we have arranged, and again draw the attention of members to the advisability of booking early.

1. The Universal Congress in Budapest.

Leave London 10.0 a.m. Wednesday, July 31st. Through reserved compartments. Members must travel out together, but may return any time within 30 days.

Fares: First-class throughout, £16:16:0 return. Second-class rail, saloon on steamer, £11:10:0 return. Book now, by paying a deposit of £1; balance to be paid by June 30th.

Accommodation in Budapest. We hope to give details in our next issue, but it may help to know that bed and breakfast in hotels costs from 3/- to 8/6, according to class. Lunch costs about 1/3 and dinner about 2/6.

2. Ostend - sur - Mer, Belgium, July 13th to 20th.

Total cost from London, including fares, accommodation, and food, £4:7:6.

3. Rouen, France, July 27th to August 3rd.

Total cost from London, including fares, accommodation, and food, £5. If saloon on boat, Newhaven-Dieppe, both ways 9/3 extra.

In each of the latter cases there is accommodation for 100, of whom about 40 will be British (B.E.A. members only). Names are rapidly being booked up, therefore very early application is now necessary to secure a place. A special leaflet for foreign Esperantists is ready, a copy of which will be sent to any member wishing to send it to a correspondent.

Passports are necessary for all three parties, but no visas are required for numbers 2 and 3.

Tickets from the provinces to London, at single fare and a third for the return journey, are issued in connection with all three parties.

PRI LA "BIBLIOTEKO TUTMONDA"

A Story with a Moral.

Kiam ni publikigis nian projekton pri Biblioteko Tutmonda, ni diris en la koncerna prospekto, ke ni eldonos la bibliotekon nur, se ĝis fiksita dato estos alvenintaj proksimume dek mil pagitaj mendoj. Nur sur la bazo de tioma abonantaro estus eble, efektivi la projekton en la intencita maniero grandstila, t.e., havigi al la Esperantistaro bele aranĝitan bibliotekon kun interesa, modela enhavo, por proporcie tre malalta prezo.

Ni ja konsciis, ke dek mil estas granda nombro, sed ni pensis, ke ĝi ne estas tro granda konsidere al la centmiloj da Esperantistoj en la tuta mondo.

Montriĝis, ke ni eraris: ĝis la fiksita dato ni ricevis eĉ ne la dekonan nombron de la supozitaj mendoj. Tamen ni kuragiĝis eldoni la bibliotekon, fidante la komprenecon de la Esperantistaro, kiu—tiel ni esperis—ekkonos la grandan valoron de nia entrepreno por la tuta mondo. Ni volonte volis fari oferojn, se ili nur rezultigus la pruvon, ke Esperanto vivas, ke ĝia movado progresas, ke ĝiaj anoj konscias pri nia helpemo por propagando. Pro la nerealigo de nia unue anoncita projekto, financa profiton el la biblioteko ni ja ne atendis.

Dum la paso de tri jaroj, ni bedaŭrinde devis sperti, ke niaj supozoj grandparte ne plenumiĝis, kaj certe ankaŭ en antaŭvidebla tempo ne plenumiĝos. La biblioteko ja vendiĝis, sed ne tiel bone, ke ni povis presigi sufice grandajn kvantojn, kies tuta vendiĝo almenaŭ estus amortizinta la elspezojn. Ni devis ekkoni, ke la Esperanta movado ankoraŭ ne estas sufice ampleksa, por ke ĝi povu akcepti literaturan entreprenon, kian ni intencis krei per nia Biblioteko Tutmonda.

Por ne plenigi nian stokon per grandaj kvantoj da kajeroj nevenditaj, ni jam de antaŭ pli ol unu jaro prokrastis la daŭrigon de la biblioteko. Nur antaŭ ne longe ni komencis la trian serion per kajero n-oj 21-22, por plenumi insistajn petojn de abonintoj. Sed laŭ la cirkonstancoj ne estas antaŭvideble, kiam ni povos elvenigi la duan kajeron de la tria serio, kaj en kiuj intertempoj povos sekvi la ceteraj. Alivorte: ni decidis —ne sen granda bedaŭro—nun prokrasti la daŭrigon de Biblioteko Tutmonda ĝis nefiksita tempo.

RUDOLF MOSSE, Esperanto-Fako.

LA DUA-DIMANĉA RONDO

Post la ĉiumonataj Esperantaj Diservoj en Londono kelke da ĉeestintoj ordinare trinkas teon kune en apuda restoracio. En la lastaj monatoj kreskanta nombro kunvenis en la Hotel Great Eastern, Liverpool Street, kie iu aŭ alia malavara amiko eĉ gastigis ĝis tridek aŭ pli da Esperantistoj.

Je kunveno post la Diservo en Januaro S-ino Blaise proponis, kaj la ĉeestantoj konsentis, ke de nun post la Diservo oni kunvenos regule ĉe la Hotelo Great Eastern. Aparta loko estos rezervita por Esperantistoj, kaj oni povas poste resti por paroladoj kaj amika babilado. Oni decidis, ke iu ajan Esperantiston estos bonvena, kondiĉe nur, ke li ĉeestis la Diservon. Ĉiu parolado publike devas fariĝi en la Esperanta lingvo. Regulaj ĉeestantoj estas petataj pagi po 1/- jare, por fariĝi Rondanoj: la sumo tiel kolektita estos uzebla por gastigo de alilandaj vizitantoj. La Diservo okazas la duan dimanĉon de ĉiu monato, pro tio la nomo de la Rondo. De nun ĉiu vizitanto pagos po 1/6 por la propra mango (tio enkalkulas aldonajon por la kelnero). Oni kore bonvenigas novajn anojn, aŭ vizitantojn el aliaj urboj aŭ landoj.

MOVADO FEDERACIA.

East Midland. La Konferenco de 12 Januaro en Mansfield estis bone ĉeestata. Ĝi estis pli ol ordinare interesa, pro humora teatrajo: *Alkosta Mensogado*, kiun lerte ludis la aŭtoro, S-ro H. Hooper, kun kvin aliaj Mansfieldanoj.

Lancashire and Cheshire. Je 26 Januaro okazis Konferenco en la Urbdomo, Blackburn. La urbestro faris tre amikan parolon de bonvenigo, kaj finis per membrigado al la B.E.A. La bela ĉambro estis plena, kaj ĝi bone sukcesis. Vespere, veturnigite per specialaj tramoj, oni festenis ĉe la Kooperejo, kaj poste ĝuis dancadon, ankaŭ bonegan prezenton de *Bardell kontraŭ Pickwick*, pri kiu ni gratulas la Blackburnan Grupon.

South Midland. Ĉe la Konferenco en Letchworth, 19 Jan., la loka grupo prezentis bonan propagandan teatrajon *La Packonferenco*, kiun verkis loka grupano. Bonaj raportoj en la loka gazeto.

West Midland. La Konferenco de 19 Januaro en Bourneville bone sukcesis. Krom la kutimaj aferoj, okazis pubika propaganda kunveno kaj du debatoj. Eble la ĉefajo de la Konferenco estis Diservo Esperanta ĉe la Paroha Pregejo, laŭ permeso de la Episkopo de Birmingham. Ĉeestis 200, inter kiuj multaj eksteruloj. Pastro E. Hyman kondukis la Diservon, kaj S-ino Blaise predikis.

MOVADO GRUPA, KURSA, LOKA.

Barry. Okazas du kursoj: unu lunde, 7.0, ĉe Knabina Lernejo, High St.; la alia vendrede, 7.0, ĉe 61 Porthkerry Rd., kaj 45 Castle St. alterne. La Konferenco de

Zamenhofa Tago bone sukcesis. Je 2 Jan. kunvenis 70 membroj kaj amikoj por socia kunveno; oni donacis al F-ino E. B. Smith, la grupinstruistino, argentan biskvitujon.

Birmingham. February 27, Ŝaradoj. Marto 6, Ludoj. Marto 13, Debato: "Ke la nuna registro ne estas malutila al la ŝtato."

Blackburn. Zamenhofa Tago estis konvene festita: oni maltegis bildon de D-ro Zamenhof por la Grupejo. Jarkunveno, 12 Jan., montris du kursojn kaj kreskon de membraro; librovendoj dum la jaro sumis ĝis £6:15:0. Vidu ankaŭ L. and C. Federacion, supre.

Croydon. Lunde, 7.30, okazas bone ĉeestata kurso sub S-ro K. C. Sturmer, ĉe Y.M.C.A. Hall, North End, apud stacidomo W. Croydon. 12 lecionoj, 2/-.

Dover. La grupo nun kunvenas marde, 8.0, ĉe 21 Ashley Avenue.

Edinburgh. Feb. 20, "Se mi estus sinjorino." Feb. 27, Teatrajo. Marto 6, Imita Proceso. Marto 13, Hindujaj Spertoj.

Glastonbury. S-ino Gregory nun instruas senpage ĉe Congregational Church Schoolroom, jaŭde, 6.30-7.30.

High Wycombe. S-ino J. Bowers parolis 28 Jan. antaŭ la Virina Ko-op. Gildo. Oni esperas starigi kurson.

Leeds. Je 19 Januaro okazis la Jarkunveno. Ĉeestis samideanoj el ok aliaj urboj. Vespere la ĉefaj eroj estis du teatraj: *La Dormanta Belulino*, lerte prezentita de infanoj el Northcote Girls' School; kaj *Elpelu Lin*, de anoj de la Leeds'a Grupo. La veterana S-ro H. Blakey, kiu partoprenis la unuan prezenton de *Elpelu Lin* en 1909, nun ree partoprenis en alia rolo. Kantado kaj jonglado kontribuis al la plezuro de ĝuinda vespero.

Liverpool. Feb. 18, Legajoj. Feb. 25, Imita Proceso. Marto 4, Imagajoj. Marto 11, Amikeca kunveno.

London Club. Feb. 19, Socia Kunveno (6p). Feb. 22, Jarkunveno. Feb. 26, Rakontoj el Esperantujo. Marto 1 Vespermango (213 Oxford St., W.1. Biletoj 3/-). Marto 5, Esperanto kaj Brita Politiko. Marto 8, Visto (1/2). Marto 12, Komuna Kantado. Marto 15, Ĉu Esperanto povas pacigi la mondon?

Manchester. Feb. 21, Dolcaj Memorajoj. Feb. 28, Metu kaj Prenu. Marto 6, Paroloj de lernantoj. Marto 13, Gramatikaj Demandoj.

Middlesborough. La paroladon anoncitan en nia lasta numero faris ne S-ro Swan, sed S-ro R. Lishman.

Nelson. Nova sekretario: S-ro J. W. Summersgill, 160 Every St.

Newcastle. Feb. 19, Trifles and Treasures. Marto 5, La lando de la Inkaoj.

Oldham. Ni ĝojas anonci la filiigon de la grupo en Oldham. Sekretario: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne St., Oldham. Longan vivon kaj plenan sukceson!

Rushden and Higham Ferrers. Nova sekretario, S-ro W. Percival, 9, Woburn Place, Rushden, Northants.

Sheffield. Kun intereso ni ricevis N-ron 1 de la gruporgano: *La Sheffielda Esperantisto*. Ni deziras al ĝi longan kaj utilan vivon. Redaktoro: C. W. Gardner, 35 Moor View Road, Sheffield.

Feb. 26, Lingvaj Demandoj. Marto 12, Marks kaj Spencer.

Welwyn Garden City. La Jarkunveno okazis 7 Januaro. Oni reelektis D-ron R. H. Crowley kaj S-ron C. G. Chinn Prezidanto kaj Sekretario. Kurso por lernantoj okazas lunde, 6.30, kaj interparola rondo la duan kaj kvaran merkredojn, 8.15. Detaloj ĉe S-ro Chinn, 7 Melbourne Court.

KRONIKO FAKA.

"Novspirito" (New Thought).- Jen nova dumonata gazeto, redaktata de unu el niaj membroj, kun la celo diskonigi la instruojn de Nova Spirito al la Esperantistaro, kaj Esperanton al la Novspiritanoj. La unua numero enhavas artikolojn pri la Novspiritaj Movado kaj Principaro, Praktika Psikologio, Gusta Pensado, k.s. Prezo 2/6 iare: unu numero 5p: ĉe B.E.A. Oni

presigis krome eldonon de la unua numero en la angla lingvo, por celoj de komparo : prezo 4p.

Rotario. En la Januaro *The Rotary Wheel* aperas, krom diversaj aludoj al nia lingvo, tutpaĝa artikolo en Esperanto, kun angla traduko sub ĉiu linio. Ni gratulas la progreseman gazeton, ankaŭ la verkinton, S-ron D. P. Boatman.

NASKIĜO.

Bowyer.—Al Ges. Willis Bowyer, Huddersfield, je 30 Decembro, 1928, filino.

MORTOJ.

Cowper. Je 30 Januaro, Charles Edward Cowper, F.B.E.A., de Quentin Road, Lee, kaj The Marina, Deal, 80-jara. S-ro Cowper estas unu el la fondintoj de la B.E.A. Nia regularo estas grandparte lia laboro. Gis sia morto li laboris konstante kaj sindone por nia afero. En la lastaj monatoj li sendis al la B.E.A. multajn utilajn ideojn, kaj li mem ĵus atingis rimarkindan sukceson por nia movado.

Stuart. Post longa malsano, ĉe Canford Cliffs, Dorset, je 15 Novembro, 1928, la Honourable Charles Patrick Stuart, plej junu filo de la mortinta Earl Castle Stuart, el Stewart's Town, Tyrone ; 36-jara.

VARIOUS.

Divine Service in Esperanto will be held in St. Ethelburga's Church, 72 Bishopsgate, E.C.2, at 3.15, on Sunday, March 10th, when the speaker will be Mr. A. H. Constance, F.B.E.A., and the singer Miss D. Barnett; followed by a meeting of the Duadimanĉa Rondo en Great Eastern Restaurant, Liverpool St.

Stop-watch Competition arranged in connection with the Joseph Rhodes Memorial Fund. The watch stopped at 7h. 4m. 20s. The winner was Mr. George Luscombe, Jr., whose name was placed exactly to the time indicated by the watch. The sealed box containing the watch was opened by Mrs. Merchant at the Conference in Leeds, 19th January. Hearty thanks are expressed to all who helped to make the competition a success.

Pastro J. C. Rust. La parohanoj ĉe la preĝejo en Soham, kie S-ro Rust pastris 53 jarojn, celas meti memorigan fenestron en la preĝejon por lia honoro. Esperantistoj kiuj danke memoras la longajn servojn kiujn Pastro Rust faris por la movado, kaj lian tradukon de la Nova Testamento, estas invititaj sendi kontribuojn al F-ino E. Fyson, The Bungalow, Clay St., Soham, Cambs.

The British Esperanto Association (Inc.),
142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C. 1.

Official Notices.

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

| | |
|--------------------------|--------------------------|
| Avanzini, F-ino May | Leigh-on-sea |
| Bamber, Walter | Rochdale |
| Barham, F-ino Ivy | Caterham |
| Bourdillon, Robert B. | London, N.W. 11. |
| Bramley, John C. | Bradford |
| Briggs, Tom G. | Woodthorpe, Nottingham |
| Cather, William A. | Torquay |
| Crowe, Charles E. | Burton-on-Trent |
| Duckworth, Robert | Nelson |
| Elwes, Dudley A. | Wavertree, Liverpool |
| Farr, F-ino Rose A. | Barry, Cardiff |
| Finlay, F-ino Sarah | Battersea, London |
| Geary, Frank | Putney, London |
| Goss, Rev. John H. | Adelaide, Sth. Australia |
| Grant, F-ino Margaret E. | Barry, Cardiff |
| Grant, F-ino Patience | Barry, Cardiff |
| Hall, John R. | Chorley |
| Hawkins, F-ino Gladys E. | Exeter |
| Hicks, Arthur J. | Parkestone |
| Hodson, William M. | Barry, Cardiff |

| | |
|---------------------------|----------------------|
| Howard, Arthur V. | West Hartlepool |
| Johnson, Kenneth B. | Stoke-on-Trent |
| Letts, J. Knowler | Greenfield |
| Lewis, Noman W. J. | Balham London |
| McKee, John | Twechar, Scotland |
| McLay, Jack V. G. | London, S.W. 1. |
| Mackintosh, William H. | Portsmouth |
| Malley, F-ino Mabel | Garstang |
| Midas, Frederic C. | W. Hampstead, London |
| Miller, Jos. | Bolton |
| Miller, F-ino Rose | Barry, Cardiff |
| Ormerod, John A. J.P. | Blackburn |
| Ormrod, S-ino Margaret A. | Cleckheaton |
| Paul, F-ino Lilian H. | Barry, Cardiff |
| Roberts, Bruno | Clapham, London |
| Rogers, F-ino Ivy S. | Banbury |
| Steele, John | Rochdale |
| Stone, S-ino Gertrude | Barry, Cardiff |
| Sykes, Arnold D. | Nottingham |
| Tonge, Roland | Bradford, Manchester |
| Vaughan, R. F. | B.N. Borneo |
| Vickery, F-ino Edith | Leigh-on-Sea |
| Walters, W. E. | Wimbledon, London |
| Watkins, F. S. | Michigan, U.S.A. |
| Webber, F-ino Bessie K. | Barry, Cardiff |
| Whittaker, Harold | Rossendale |
| Wilson, S-ino Elizabeth | Walthamstow, London |
| Yeo, Lyndon C. R. | Barry, Cardiff |

CANDIDATES FOR JUNIOR MEMBERSHIP.

| | |
|----------------------------|-----------------------------|
| Bishop, Keith R. | Whitstable |
| Cox, W. Leonard | Sth. Croydon |
| Field, Brian | Huddersfield |
| Norris, F-ino Catherine A. | Sibford Ferris, Nr. Banbury |
| Parsons, F-ino Marjorie C. | Bournville, Birmingham. |

NEW LOCAL REPRESENTATIVE.

| | |
|---------------|-------------------------------------------------------|
| London, W. 5. | S-ino E. Nicholson, 5, Brunner Road, Ealing, W. 5. |
|---------------|-------------------------------------------------------|

NEW DELEGATE COUNCILLORS.

| | |
|-----------------------------------------------------|--|
| Bournville : H. J. Nunn. | |
| Fulham : Mrs. Chilton. | |
| Lancashire and Cheshire Federation : Mr. F. Pope. | |
| South Eastern Federation : E. F. Dean, Chas. Steel. | |
| S. Midland Federation : W. A. Gething, C. G. Chinn. | |
| Yorkshire Federation : J. T. Holmes, J. H. Fitton. | |

DONATIONS TO PROPAGANDA CAR FUND, 31/1/29.

| | |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------|
| C. M. Cather, £5; A. Bowker, £2:18:0; R. Carter, £2; A. E. Boyce, R. Goodland, £1:1:0; Miss D. Purvis, H. Ingham, P. Le Brun, F. Goodliffe, £1; G. R. Warburton, 10/6; K. R. C. Sturmer, Bath Esperanto Group, Mrs. L. de L. Hellwell, Miss D. Wilkinson, Miss E. Evans, G. J. Worthington, Mr. & Mrs. S. J. Smith, L. Mason, B.O.P.H., 10/-; Burnley Esperanto Society, 8/9; J. J. Robertson, 7/6; J. Hesketh, Miss E. Lacey, Miss E. Baldwin Smith, J. G. Kinniburgh, T. Shackleton, Southport Esperanto Society, Miss Z. A. Inman, 5/-; R. W. J. Norton, 3/2; B. Collitt, Mrs. E. Jacklin, C. E. Jacklin, A. E. Smith, Miss E. A. Lawrence, E. Lee, M. T. Whalley, F. H. Allsop, Iuino, Miss N. E. Powers, L. H. Leadley, J. D. Ashworth, F. G. Archer, 2/6; N. M. Bell, 1/9; Total amount received : £66:18:8. Additional promises : £12:11:0. Still wanted : £70:10:4. | Assistance in this connection will be much appreciated, as we wish to have the car in use as soon as possible. |
|-----------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|----------------------------------------------------------------------------------------------------------------|

DONATIONS TO B.E.A. (January, 1929).

| | |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|--|
| General Funds: Mrs. D. H. Morris, £2; Mrs. M. Gillett, £1:6:6; Familio Stacey, £1:5:0; Miss D. Purvis, 15/-; P. D. Blake, 14/6; Dowager Countess of Castle Stewart, 13/6; W. Chitty, F. F. Jamieson, Mrs. K. Halliday, 12/6; Mr. and Mrs. Sunfield, 10/-; A. Sharp, W. T. Clark, 8/6; Miss A. S. Wackrill, W. Norris Jones, J. Newbold, H. Mullion, Miss A. Arnold, Miss M. Lawrence, J. Roberts, J. Parish, Mrs. M. Flugel, W. E. Parker, Rev. T. Dale, E. J. Hale, Miss E. R. Mitchell, H. Blakey, H. Mortimer, G. F. Ramsey, A. Triffitt, Dr. H. B. Overton, E. Corner, Mrs. D. E. Jones, Rev. H. Dawtrey, Mrs. G. Le Brun, Mrs. J. McElroy, Miss E. Young, W. G. Phipps, Mrs. R. Neal, Miss N. E. Powers, Miss L. M. Deane, 5/-; G. R. Warburton, 3/-; Mrs. B. Elsworth, Mrs. M. C. Hezlett, Miss M. Moir, J. Hesketh, Miss M. Thompson, J. D. O'Dell, J. Caproni, BM/OV3F, E. Muller, W. Minchin, F. R. Pope, W. Buchan, T. J. Lake, 2/6; Miss L. M. Bedwell, 1/9. | |
| Capital (50,000 Shilling) Fund: J. G. Dibb, 160; Miss E. Watchorn, 5. Total 18,867. | |

M. C. BUTLER, Secretary.